# Saluton!

**Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 10 (25), Oktobro 2006**

**Adreso (provizora):**
**Esperanto Societo de Ŝikago**
**p/a Viktor' Pajuk**
**8228 O'Connor Dr., # 2F**
**River Grove, IL 60171**
**(773) 344-2276**
**www.esperanto-chicago.org/**

**Estraro:**
Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

**Membrokotizoj**:
Membro-subtenanto $40/jare;
Familia $30; Regula $20;
Studenta aŭ pensiula $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.
Check should be payable to the **Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our Treasurer**, Charles Gunn,** 828 S. Ada St, Chicago IL 60607


## Kunvenoj:

Membroj de La Ŝikaga E-Societo kunsidas la kvaran mardon de ĉiu monato en:
**Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**
Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Bonvenon!

**Karaj legantoj**, pro la timo de malbona kaj malvarma vetero ni nuligis organizon de tradicia "somera" pikniko fine de Septembro, kiam nia ŝatata E-societo fariĝis oficiale 35-jara. Estis decidite aranĝi pli buntan solenaĵon decembre, dum la tradicia Zamenhofa bankedo. Malgraŭ ne-okazigo de pikniko ni modeste festis en klubejo per dolĉaĵoj kaj sen-alkoholaĵoj. Krom la listigitaj en la antaŭa n-ro de SALUTON! gratuloj venis ankoraŭ unu, de nia germana partner-urbo **Hamburgo**, e-istoj de kiu festis sian 100-jariĝon en 2004 kaj nun invitas nin al la tutlanda Kongreso de germanaj gesamideanoj venontjare. Dankon!

Eĉ se oficiale nia Statuto estis registrita en 1971, historio de E-movado en la Venta urbo estas proksimume centjara. La 20-26 de Julio 1914 niaj antaŭuloj gastigis tie ĉi la 7-an kongreson de E.A.N.A. – E-Asocio de Norda Ameriko. Okazis ĝi en "The Fair", konstruaĵo sur la anguloj de State, Adams kaj Dearborn stratoj. Tio signifas, ke e-istoj "ekzistis" en Ŝikago almenaŭ kelkaj jaroj pli frue.




Post dudekjaroj "spirito" de la Majstra familio denove ŝvebis en la urba aero kaj ĉirkaŭe: en 1938 Ilinojon vizitis Lidia Zamenhof, kiu tutan sian vivon dediĉis al la patra afero. Du tagojn ŝi pasigis en Urbana, kie prelegis pri E-o kaj donis kelkajn enkonduk-lecionojn laŭ Ĉe-metodo. Maje ŝi denove vizitis Jaran Kunvenon de bahaistoj, kiu okazis en Ŝikago kaj Wilmette. Lidia estis mirigita, kiam bahaistoj de tiuj urboj kaj de Maywood petis ŝin rakonti pri IL. Libron *"Lidia"* de W. Heller oni povas akiri en Bahaisma Templo ($15.95).

Aliaj signoj de E-o en la urbo estas postmilitaj: en la societa arĥivo oni povas ekvidi menuon de Zamenhofa bankedo'62. Jam en tiu tempo estis eldonata nia bulteno SALUTON! Dank'al malnovaj numeroj estis kompilita listo de klubaj prezidantoj ekde 1962. Baldaŭ la listo aperos en nia retejo, kiun jam plibonigis administranto (kaj kasisto) s-ro Gunn. Karlo, dankon!

Kaj kiuj famaj e-istoj vizitis la Societon: Tibot Sekelj, vojaĝanto, muzeisto, fondinto de 6 (!) landaj E-asocioj, pasigis kvin tagojn inter "ni" en Julio 1984, li estis intervjuita de tri radio- kaj unu televid-stacio, parolis al studentoj de Illinois Institute kaj vizitis kvar muzeojn.

En la arĥivo oni povas vidi leteron de la plej fama nuntempa E-verkisto, kiu forpasis antaŭ unu monato – Bill Auld, li kelkfoje vizitis la societon.

**UTILAJ RET-ADRESOJ:**

UEA – Universala Esperanto Asocio
http://www.uea.org

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)
http://www.esperanto-usa.org/

Free Esperanto Course on Internet
http://www.pacujo.nu/esperanto/course

Esperanto Viva - A free online course
http://www.mintex.demon.co.uk/espviva/angla/index.htm

Internacia televido en E-o
http://internacia.tv

Reta senpaga enciklopedio
http://eo.wikipedia.org

Esperantic Studies Foundation
http://esperantic.org

Pasporta Servo
http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm

Pola Radio en Esperanto:
http://www.wrn.org/audio/pol1.ram

## Sekvantaj kunsidoj:

**24an de Oktobro** – 150-jara jubileo de I. Franko; estraran-proponoj por 2007 – elektado okazos novembre

**28an de Novembro** – d-ro Ronald J. Glossop parolos pri *Esperanto kaj Mondcivitaneco*; la elekta tago;

## 17an de Decembro Zamenhofa Bankedo 2007

Pri ĉiuj interesaj programeroj vi nepre legos de la paĝoj de *Saluton!*, sed… (ne hastu!) iom poste

Abundas oficialaj salut-leteroj de la Urbestro, de diversaj edukaj instancoj. Kaj fotoj, fotoj de niaj membroj, de iama UEA prezidanto Humphrey Tonkin, de… Vizitu nian dokumentejon, eble ni iam havos eblecon festi alian pli imponan datrevenon de nia E-societo.

*Viktor Pajuk, prezidanto*

## Oficiale

La kreskanta reta uzo de Esperanto reaktualigis la demandon pri la supersignitaj literoj en nia alfabeto. Sekve, la Estraro de la Akademio de E-o petis la Sekcion pri Prononco redakti tekston de rezolucio por poste oni voĉdonu pri ĝi. Kaj oni menciis Akademian deklaron de 1982 kun konstato, ke la ortografio de Esperanto estas <u>integra parto</u> de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion. Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, uh" (*red.* – feliĉe, nia presejo la literojn posedas).

## Okazos



Kiu sekvas la literaturajn paĝojn de E-revuoj, tiu povis rimarki pri samtempa apero (en almenaŭ tri periodaĵoj) de tradukoj el verkaro de ukraina poeto, lingvisto Ivan Franko (1856-1916) okaze de lia 150-jara jubileo. Pri tio ni parolos dum la sekvanta kunsido, kaj nun por vi – lia poemeto:

Belulin', okuloj viaj –
Mar', brilanta en kviet'.
Tie korsuferoj miaj
Dronas, kiel pulveret'.

La okuloj – puto estas,
Pura, perloj sur la fund',
Kaj por mi espero restas:
Ĝi ekflumas en profund'!

*Elukrainigis Sergeo Zikejev*

## Nin invitas

– Planu viziti la 4-an Tut-Teksasan E-kongreson, kiu okazos la 11an de Nov. 2006 en Filan domon 516 Caduceus Ln., Hurst, TX 76065; ret-informoj de: filipo@grupoj.org

– 4-a Balta E-Forumo – renkontiĝo de e-istoj el landoj apud la Balta Maro, okazos 21-26an Jul. 2007 en Kaliningrado (Rusio). Vizitu www esperanto.org/Ondo/Ind-bef.htm

De la tuta mondo kolektis novaĵojn, salutojn kaj anoncojn via obeema servanto (kaj redaktoro)

araneoesp @ yahoo.co.uk